

la 6an de Sept. 1927

Kara Amiko mia,

Mi volis tuj respondi al via letero bela sed mi ne povis. Estis la granda internacia tenisa turniro kiun organizis mia edzo + mi devis iri ĉiu tage dum unu semajno. Nun ĝi finiĝis + tiu de Paris-Plage komencis. Ni iros je la fino de la semajno, ĉiun tagon.

Vere, de post la dato kiam vi al mi konfesis ke vi ĉesos la skribadon kun mi, viaj leteroj estas pli + pli plaĉantaj. Ĉar vi parolas pri vi mem viaj impresoj, viaj timoj, viaj ~~impresoj~~ deziroj + streboj¹, mi pli ŝatas ilin. Vi, amiko, bedaŭras la sidantan² leteron. Sed mi, tute ne. Ĝi multege plaĉis al mi. La lasta ankaŭ, en kiu vi rememoris multajn belajn neforgeseblajn horojn + idealigitajn impresojn, estis al mi bela + inda je vi.

Vi ne povas imagi la grandan plezuron + ĝojon mi havas legante tiujn leterojn viajn + mi povas preskaŭ forgesi ke vi ne plu volis korespondi. Mi diras "preskaŭ" ĉar ĉiam sekvas la penso "Kiel estas domaĝe ke Li ne pli³ ŝatas skribi"!

Ĉio kion vi rakontis pri la Praha Kongreso: Insulo Žofin, la interkonatiĝa vespero, la halo Smetana, la entuziasmo, la idealeco, la tuta atmosfero de beleco, de altaj ideoj miksitaj kun la plezuro pasigi agrablajn horojn kun ŝatata amiko, ĉio, ĉio mi certigas vin estas en mia menso kvazaŭ estas hieraŭ. Mi ne povas forgesi la emocion mian dum la bela muziko ludita sur la orgeno ~~dum~~ en vespera koncerto - mia koro dolore ekbatis - ankaŭ la junan orkestestron⁴ tiel riĉan pro la edzino. Ho! la Praha Kongreso estis belega pro ĉio - kaj la bela kelnero kies du fingroj mankis - !!!

La kongreso en Wien lasis malbonan guston kompare al la Praha. Pro tio mi forlasis ĝin la Dimanĉon. Ofte, mi bedaŭris ke mi ne restis ĝis la fino. Mi neniam plu revidis D^{on} Broder de tiu dimanĉo.

Vi diras ke mia P.K. el Munster montras ke mi ne forgesas pri ~~mi~~ vi. Estas vere, sed vi ne bezonas P.K. por scii tion. Vi, nuntempe post tiom da jaroj da fidela korespondado, devas koni min + esti certa ke, kiam mi entreprenis ion, mi ĉiam plenumas tion - nur la aliaj povas malhelpi min fari tion kion mi decidis. Forgesi longjaran, indan amikon + korespondinton ne estus ebla + tion vi devas scii ĉu ne amiko?

Se niaj interrilatoj ŝajnas iomete esti malpli intensaj, malpli oftaj, estas nur pro via kulpo + tion ankaŭ vi devas scii, ĉu ne?

la 7an Aug.⁵ 21h 1/2

Mi estas tute sola en tiu-ĉi granda domo. Lucien pledas en la nokta tribunalo: "Conseil des Prud'hommes" (Tribunal por la malkonsento inter mastroj + servistoj).

Mi pasigis la tutan posttagmezon en Paris-Plage kun kolonelo angla kiun ni kunprenis en la aŭtomobilo. Ni revenis je la 20h 1/2 + Lucien ne havis tempon eĉ vespermanĝi. Do, solega mi estas (la geservistoj ne kuŝas ĉi-tie) + mi sendas amikegan penson al mi Ĉeka korespondinto kiun mi tiel bedaŭras.

¹ ? pri tiu vorto mi ne certas ...

² ? mi ne certas pri la vorto

³ ĉu "plu" ?

⁴ ĉu "orkestr-estron" ?

⁵ ĉu "Septembro" ?

Via Evička devas esti tre beleta se ŝi similas al ŝia⁶ patrino. Kisu ŝin por via malproksima franca amikino. Kiel mi ŝatus vidi ŝin !

Kaj la dancado via? Kiel ĝi progresas? Mi ĉiam dancas + mi tion ŝatas. Estas grandaj mondanaj baloj ĉi-tie dum la sezono kiu estas nuntempe.

Mi ankaŭ tiel bonege rememoris la adiaŭan nokton tra la fenestro en 1921. Tio estis tre malgaja afero! Kiel estas ĉiam adiaŭoj en la vivo + tamen la vivo estas nur farita de adiaŭoj.

Tamen, malgraŭ la vivo, mi finas mian leteron sen adiaŭo, kontraŭe, ~~kun~~ per: "Ĝis la revido kiel eble plej baldaŭa."

Dankante vin ĉiam pro la granda plezuro kiun donas viaj belaj maloftaj leteroj. Ĉiam samideane + samidealane

Alice Sergeant

⁶ ĉu "sia" ?